# Esperanto - La Bitbulteno 89

esperanto.es

## SE ACERCA EL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN SEVILLA

Se va acercando poco a poco el momento de celebración del Congreso Español de Esperanto, que, como es sabido, tendrá lugar en Sevilla entre el 12 y el 15 de octubre.

Las informaciones básicas y el boletín de inscripción pueden encontrarse en la web kongreso.esperanto.es. Puedes consultar allí la actual versión (provisional) del programa, centrado en el tema "comprensión entre los pueblos". También puedes consultar el listado de personas ya inscritas, unos 140 esperantistas, de más de una docena de países.

También se ha programado un precongreso universitario al que todos los inscritos están invitados, el 10 y 11 de octubre, que se celebrará en las Facultades de Filología y Psicología, y contará con la participación de un nutrido panel internacional de ponentes. Puedes ver ya la información en este enlace.





## CURSOS EN LAS UNIVERSIDADES

Gran novedad: en la Universidad de Sevilla, a través del Instituto de Ciencias de la Educación, se oferta el curso *Esperanto como herramienta universitaria* para su personal docente e investigadora, de forma gratuita y con derecho a una acreditación final de aprovechamiento. Esta formación se realiza en colaboración con Civiencia, empresa de base tecnológica con amplia experiencia en el idioma. Más detalles, aquí.

El 7 de septiembre se ha abierto el plazo para una nueva edición de los cursos de esperanto organizados por la Universidad Nacional de Educación a Distancia (UNED), con la colaboración de la Federación Española de Esperanto. Recordamos que son cursos en línea, con profesores y asistentes de conversación, con un título oficial de la UNED, y que se imparten en dos niveles, el nivel A2 (básico) y B1. Puedes ver la guía del curso y matricularte en la web http://www.cuid.uned.es ("modalidad en línea"), y más concretamente en este enlace. El plazo finaliza el 23 de octubre.

Finalmente, recordamos que hasta el 12 de septiembre está abierta la matrícula de los estudios universitarios sobre Interlingüística de la Universidad Adam Mickiewicz de Poznan (Polonia),

reconocidos como estudios de nivel máster en la UE. Más información, en este enlace.




## EN LOS MEDIOS DE COMUNICACIÓN

Recordamos que el día 26 de julio se celebró el Día del Esperanto, y que entre el 29 de julio y el 5 de agosto tuvo lugar en Turín el Congreso Universal de Esperanto (cuya resolución final, sobre el tema “Inmigración - confluencia de valores humanos”, puedes leer traducida al castellano en la página web de la Federación, en este enlace). Ambos asuntos fueron la ocasión para varias apariciones del esperanto en medios de comunicación en español.

El Día del Esperanto hubo varias menciones en periódicos, pero la aparición más destacada tuvo lugar en Televisión Española, TVE-1, en el programa “Ahora o nunca”. La periodista Arancha Bello visitó la sede de la Federación Española de Esperanto y presentó un reportaje con la participación de Ricardo Biurrun, Pedro Hernández y Alejandro Pareja, que fueron filmados conversando en esperanto, y Roberto Garvía, que presentó su opinión como experto. Puedes acceder a una parte aquí, y el conjunto, incluyendo la presentación desde el plató, en este enlace.

El Congreso Internacional fue muy seguido en los medios de comunicación italianos. Entre ellos, la agencia de noticias del Vaticano publicó un extenso reportaje, también en español, sobre las actividades de los esperantistas católicos, que presentaron dos libros en el Congreso: uno con textos del papa Francisco y otro, una biografía de Tito Brandsma, esperantista recientemente canonizado, escrita por el carmelita español Fernando Millán Romeral. Como consecuencia, también el diario ABC presentó un amplio reportaje, con el curioso título "Dos mil devotos mantienen viva la llama del esperanto".

Uno de los asistentes al congreso, Eduardo Berdor, fue entrevistado en la radio autonómica Aragón Radio. Puedes escuchar la entrevista en este enlace (el min. 16).



## PREMIOS A ESCRITORES ESPAÑOLES

El último día del Congreso Universal de Esperanto de Turín, la Asociación Universal de Esperanto anunció la concesión de diplomas a destacados esperantistas, por su actividad en la comunidad esperantista o sus valores artísticos. Dos de ellos fueron concedidos a escritores procedentes de nuestro país: Miguel Fernández Martín y Miguel Gutiérrez Adúriz (conocido como Liven Dek), respectivamente presidente y secretario de los concursos literarios en esperanto, por sus contribuciones como literatos, traductores y en general animadores culturales. Puedes leer el reconocimiento completo (en esperanto) así como la lista de premiados en este enlace.

También podemos mencionar que en los citados concursos literarios de UEA ("Belartaj Konkursoj"), otros dos españoles, Antonio Valén y Francisco Javier Moleón, recibieron sendas menciones honoríficas. La lista completa puede consultarse en este enlace,

Enhorabuena a todos los premiados.





## EDITADO LIBRO EN ESPAÑOL CON PIEZAS DE LA LITERATURA EN ESPERANTO

Otra noticia sobre otro escritor en esperanto de la llamada "escuela ibérica": a finales de septiembre se publica en España el libro "Las abejas y lo invisible", traducción de "Die Bienen und das Unsichtbare" del escritor y traductor austriaco Clemens J. Setz, en versión de José Aníbal Campos. Se trata de una antología de textos sobre lenguas planificadas, desde el punto de vista literario; una tercera parte trata sobre el esperanto, y en él un capítulo entero trata sobre la poesía de Jorge Camacho, con poemas en esperanto y español.

Clemens Setz es un importante autor de la literatura en lengua alemana, ganador en 2021 del Premio Georg Büchner, el más importante en ese ámbito, y que ha mostrado en numerosas ocasiones interés por la literatura en esperanto.

El libro se puede ya reservar en la editorial H&O Editores.




## CAMPAÑA PARA EL MANTENIMIENTO DE LOS CURSOS DE DUOLINGO

Como informamos en nuestro anterior Boletín Electrónico, la gran compañía de aprendizaje de idiomas en red, Duolingo, ha anunciado la desaparición de los cursos de esperanto por medio de otras lenguas que no sean el inglés, incluyendo el curso desde el español.

Recientemente la Asociación Universal de Esperanto ha lanzado un nuevo llamamiento para adherirse a la campaña para solicitar a Duolingo que modifique su decisión, que puedes leer aquí.

Lo recordamos también porque en nuestra noticia había un error en el enlace para colaborar en la petición. Si no pudiste hacerlo entonces, puedes firmar ahora en la web: https://www.change.org/p/for-the-duolingo-esperanto-courses-por-la-esperanto-kursoj.

¡Colabora!




**CENTENARIO DE UN PIONERO EN EL DÍA EUROPEO DE LAS LENGUAS**

Este 26 de septiembre se conmemora el centenario de la muerte de Ricardo Codorniú Stárico, el primer presidente de los esperantistas españoles, y persona muy destacada en ámbitos científicos e intelectuales.

Profesionalmente era ingeniero de montes, y su actividad en la repoblación de las sierras murcianas y las dunas de Guardamar de Segura, le hizo tan famoso que es a menudo mencionado como "el apóstol del árbol", y se le considera como unos de los primeros ecologistas de España. También se interesó por las lenguas construidas y fue una de las primeras personas en aprender esperanto en nuestro país. En 1903, con ocasión de la fundación de la Sociedad Española para la Propaganda del Esperanto, fue elegido su primer presidente.

En Murcia y en Guardamar están previstas diversas actividades en su memoria y hacemos un llamamiento a los grupos a realizar actividades de recuerdo, especialmente dado que ese día se celebra el Día Europeo de las Lenguas, que siempre es una buena ocasión para presentar nuestra lengua en ambientes externos.



**ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA DE LA FEDERACIÓN**

Durante el Congreso Español de Esperanto tendrá lugar la Asamblea Ordinaria de la Federación Española de Esperanto. Copiamos a continuación la convocatoria para los socios:

El Presidente de la Federación Española de Esperanto convoca a los miembros de la asociación a participar en la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el jueves 12 de octubre de 2023, a las 17:00 horas en el marco del 81º Congreso Español de Esperanto que tendrá lugar en Sevilla, Avenida Blas Infante 4, 7ª planta, con el siguiente orden del día:
1.- Aprobación del acta de la anterior asamblea (21 de mayo de 2023)
2.- Comentarios sobre los documentos que se aprobaron en la anterior asamblea
3.- Cuotas de socio para el año próximo
4.- Proyectos para el año próximo
5.- Dónde celebrar el congreso del año próximo
6.- Ruegos y preguntas

Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, deben

enviar un mensaje indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico:

admin@esperanto.es

, antes del 9 de octubre.
El Presidente de la Federación: Ángel Arquillos López




## ALPROKSIMIĜAS LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO EN SEVILO

Iom post iom alproksimiĝas la celebrado de la Hispana Kongreso de Esperanto, kiu, kiel vi scias, ĉijare okazos en Sevilo inter la 12a kaj 15a de oktobro.

La bazaj informoj kaj la aliĝilo troviĝas en la retejo kongreso.esperanto.es. Oni povas tie elŝuti la nunan (provizoran) programon, kies baza temo estas "komprenemo inter popoloj". Ankaŭ eblas konsulti la liston de aliĝintoj, ĉirkaŭ 140 personoj, el pli ol dekduo da landoj.

Oni ankaŭ programis universitatan antaŭkongreson, al kiu ĉiuj kongresanoj estas invitataj, la 10an kaj 11an de oktobro, en la Fakultatoj de Filologio kaj Psikologio. Ni atendas la partoprenon de ampleksa aro da internaciaj prelegantoj. Aliru la informojn en jena ligilo.

Sevilo estas belega urbo, kun multaj altiraj vidindaĵoj. Se vi volas koni pli pri la urbo, vi povas viziti la vikipedian artikolon pri ĝi, tiom kompletan, ke dum la monato aŭgusto ĝi estis selektita kiel "artikolo de la monato", kaj ĝi okupis la ĉefpaĝon de la retejo.




## KURSOJ EN UNIVERSITATOJ

Ankaŭ el la Universitato de Sevilo ni ricevis grandan informon: ĝia Instituto por Eduksciencoj proponas kurson kun titolo Esperanto kiel universitata ilo por instruistoj kaj esploristoj de la Universitato, tute senpagan kaj kun oficiala diplomo. La instruado okazas kunlabore kun Civiencia, entrepreno kun ampleksa sperto en la lingvo. Pliajn detalojn, en tiu ĉi ligilo.

La 7an de septembro malfermiĝis la ebleco enskribiĝi en nova eldono de la kursoj de Esperanto organizitaj de la Ŝtata Universitato por Nacia Edukado de Hispanio (UNED), kun la kunlaboro

de Hispana Esperanto-Federacio. Ni rememorigas ke ili estas instruataj rete, kun oficialaj instruistoj kaj konversad-helpantoj, kaj ili estas alireblaj ne nur el Hispanio, sed ankaŭ el multaj landoj el Eŭropo, Latinameriko kaj aliaj kontinentoj en kiuj UNED havas filiojn. Ĝi havigas oficialan diplomon de la Universitato, en du niveloj, A2 (baza en la kazo de Esperanto) kaj B1. Vi povas aliri la gvidilon de la kurso en la retejo http://www.cuid.uned.es ("modalidad en línea"), kaj pli konkrete en tiu ĉi ligilo. Eblas enskribiĝi ĝis la 23a de oktobro.

Fine, ni memorigas ke ĝis la 12-a de septembro estis plilongigita la limperiodo por aliĝi al la 2-jaraj magistraj studoj pri interlingvistiko ĉe Adam-Mickiewicz-universitato de Poznano (Pollando). Pliajn informojn en tiu ĉi ligilo.




## EN LA GAZETARO EN SOMERO

La Tago de Esperanto, la 26-a de Julio, kaj la Universala Kongreso en Torino estis la okazoj por aperigo de artikoloj pri Esperanto en diversaj hispanlingvaj amaskomunikiloj.

Dum la Tago de Esperanto estis legeblaj kelkaj mencioj en ĵurnaloj, sed la plej interesa estis la apero en la ŝtata televido, TVE-1, en la programo "Ahora o nunca" (Nun aŭ neniam). La ĵurnalisto Arancha Bello vizitis la sidejon de Hispana Esperanto-Federacio kaj filmis raporton, kun la partopreno de Ricardo Biurrun, Pedro Hernández kaj Alejandro Pareja, kiuj estis filmitaj interparolante en la lingvo, kaj Roberto Garvía, kiu klarigis la nunan staton kiel spertulo. Vi povas vidi parton en tiu ĉi socia retejo kaj pli komplete, kun la enkonduko al la lingvo, tie ĉi.

La eĥo de la Universala Kongreso estis tre ampleksa en Italio, kie aperis longaj raportoj en diversaj ĵurnaloj. Inter ili, la novaĵagentejo de Vatikano publikigis ampleksan raporton, ankaŭ en la hispana, pri la aktivaĵoj de la katolikaj esperantistoj, pro la prezento de du tradukoj: unu de vortoj de papo Francisko, kaj alia, tradukita el la hispana, biografio de Tito Brandsma, esperantisto ĵus kanonizita, verkita de la hispana karmelano Fernando Millán Romeral. Kiel plia konsekvenco, la ĵurnalo ABC prezentis ampleksan raporton, kun la kurioza titolo "Du mil devotuloj konservas la flamon de Esperanto".

Unu el la partoprenintoj en la Universala Kongreso, nia samideano Eduardo Berdor, estis intervjuita pri sia sperto en la regiona Aragón Radio. Oni povas aŭskulti la dialogon en tiu ĉi ligilo (desde el minuto 16).




## PREMIOJ AL HISPANAJ VERKISTOJ

La lastan tagon de la Universala Kongreso oni anoncis la Diplomojn de UEA pri Elstara Agado kaj pri Elstara Arta Agado. Du el ili venis al verkistoj el Hispanio: Miguel Fernández Martín ricevis ĝin "pro la plurjara konscienca prezidado de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj aliaj grandaj kontribuoj al la artoj en Esperanto, aparte pri poezio, tradukoj, muziko kaj komentarioj (...)" kaj Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek) "pro la plurjara sekretariado de la Belartaj

Konkursoj de UEA kaj grandaj kontribuoj al la artoj en Esperanto, aparte pri verkado, eldonado, tradukoj, filmado kaj muziko. (...)". Vidu la plenan liston kaj agnoskon en tiu ĉi ligilo.

Ni devas krome mencii ke en la ĉijara eldono de la menciitaj Belartaj Konkursoj du verkistoj el Hispanio ricevis honorajn menciojn, Antonio Valén en la branĉo kantoteksto kaj Francisco Javier Moleón en la branĉo mikronoveloj. Vidu la liston en tiu ĉi ligilo,

Gratulon al ili kaj al la ceteraj premiitoj!




**LIBRO PRI PLANLINGVOJ TRADUKITA EN LA HISPANAN**

Ni havas novaĵon pri alia hispana esperantista verkisto.

Fine de septembro aĉeteblos en hispanaj librovendejoj la libro "Las abejas y lo invisible", hispanigo de la verko "Die Bienen und das Unsichtbare" (La abeloj kaj la mondo ne videbla) de la aŭstra verkisto kaj tradukisto Clemens J. Setz, en elgermanigo de José Aníbal Campos. Temas pri antologio de planlingvoj el literatura perspektivo: triono pri Esperanto kaj unu tuta ĉapitro pri la poezio de Jorge Camacho, kun poemoj paralele en Esperanto kaj la hispana.

Clemens Setz estas tre grava verkisto en la nuntempa germanlingva literaturo, gajninto de la Premio Georg Büchner, la plej grava premio de tiu fako, kaj plurfoje montris intereson pri la literaturo en Esperanto.


Jam nun eblas antaŭaĉeti la libron rete rekte ĉe la eldonejo H&O Editores.

**KAMPANJO POR KONSERVO DE LA KURSOJ DE DUOLINGO**

En la pasinta Bitbulteno ni diskonigis ke la granda kompanio por reta lernado de lingvoj, Duolingo, estis anoncinta la malaperigon de la kursoj de Esperanto en aliaj lingvoj krom la angla, inklude de la hispana kurso, kaj ke TEJO (Tutmonda Esperanta Junulara Organizo) lanĉis kampanjon por tion malhelpi.

En la pasintaj tagoj, UEA lanĉis alvokon por la revigligo de la kampanjo.

Ni rememorigas tion ankaŭ ĉar en nia pasinta eldono enŝteliĝis eraro en la ligilo por kunlabori en la kampanjo. Se tiam vi ne povis tion fari, provu denove ĉe: https://www.change.org/p/for-the-duolingo-esperanto-courses-por-la-esperanto-kursoj.



## CENTA DATREVENO DE PIONIRO, EN LA EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

La 26-a de septembro ĉijare estas la centa datreveno de la morto de Ricardo Codorniú Stárico, la unua prezidanto de la hispanaj esperantistoj, kaj homo tre grava en pluraj facetoj de la scienco kaj la socio.

Profesie li estis forsta inĝeniero, kaj lia agado rilate al rearbarigo, ĉefe en murcia regiono kaj en la urbo Guardamar del Segura (Gvardamaro) igis lin fama, tiom ke li estis konata kiel "la apostolo de la arbo". Li foje estas konsiderata kiel unu el la unuaj ekologiistoj de Hispanio. Li frue interesiĝis pri la provoj krei universalan lingvon, kaj fariĝis fervora esperantisto, aktiva en la orienta regiono. En 1903, okaze de la fondo de tuthispana asocio, la Hispana Societo por la Propagando de Esperanto, li estis nomumita ties unua prezidanto.

En Murcio kaj en Gvardamaro estas planataj omaĝoj al lia memoro, kaj ni instigas aliajn grupojn memorigi lian agadon, des pli ke tiun tagon oni celebras la Eŭropan Tagon de Lingvoj, kaj tiu estas tre bona okazo prezenti nian lingvon en eksteraj rondoj.




## ORDINARIA ĜENERALA KUNVENO DE HEF

Dum la Kongreso en Sevilo okazos Ĝenerala Kunveno de HEF. Ni kopias la kunvokon por la anoj:

La Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio alvokas la anojn de la asocio partopreni Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 12-an de oktobro de 2023 (ĵaŭde), je la 17:00 horo, kadre de la 81a Hispana Esperanto-Kongreso kiu okazos en Sevilo, avenuo Blas Infante 4, 7a etaĝo, laŭ la jena tagordo:
1.- Aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (21a de majo 2023)
2.- Komentoj pri la dokumentoj kiuj estis formale aprobitaj en la antaŭa kunveno
3.- Membro-kotizoj por la sekva jaro
4.- Projektoj por la sekva jaro

5.- Kie okazos la venontjara kongreso
6.- Sugestoj kaj demandoj

La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de alia membro, sendu mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon kaj de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEF-a retpoŝta adreso admin@esperanto.es, antaŭ la 9a de oktobro.
La Prezidanto de HEF: Ángel Arquillos López